



La Suda Kruc

Oficiala Organo de la Australasian Esperanto Association.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,

Melbourne (Aŭstralio)

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.

Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 4 respondkuponoj.

N-roj 12-13. Melburno (Melbourne), Australio.

1 Julio, 1921.

Peto pri Senkulpigo.

Ĉi tiu ekzemplero de la Suda Kruc aperas malfrue. Ĉiuj personoj, kiuj laboras por ĝi, tion faras senpage; do, ni ne rajtas esti tro postulemaj rilate iliajn agojn. Plie, la Redaktoro devis forlasi Melburnon por akcepti gravan oficon ekster Australio, kaj ne povis tute kompletigi ĉi tiun eldonon, antaŭ ol li foriris.

De nun la A.E.A. estos responda por la eldonado de la Suda Kruc, kaj sub la gvidado de nova aro de entuziasmuloj, oni esperas, ke estonte nia tre ŝatata, kvankam malgranda, gazeto, aperos akurate la unuan semajnon en ĉiu monato.

Se ĉiu abonanto daŭrigos sian abonon por la nova jaro, kaj se ni gajnos cent novajn abonantojn ni povas pligrandigi nian gazeton kaj eldoni ĝin ne ĝenate pri financaj konsideroj. Ĉi tiu ekzemplero estas la unua de la nova serio. Do nova abono estas nun pagebla. Karaj legantoj sendu viajn abonojn senprokraste!

was held at Geneva from 30th March to 7th April last. The members of the congress were delegates from the national Red Cross societies, and some of them attended as representatives of Governments. After consideration of the proposal by Dr. Wong (China), supported by the Swiss, Serbian, German, Argentine, and Polish delegates, the following resolution was unanimously agreed to:—

“Being convinced that the language difficulty in many ways prevents the realisation of the international idea of the Red Cross in the work of succour on the field of battle, as well as among prisoners of war, or even in congresses of the Red Cross, the Tenth Congress exhorts all Red Cross organisations to encourage the study of the auxiliary language, Esperanto, by their members, especially the young peoples’ section, as one of the most effectual means of attaining international understanding and co-operation in carrying out the aims of the Red Cross.”

The Red Cross Society Supports Esperanto.

Very encouraging information has just reached us. The Tenth International Conference of the Red Cross

Every Australasian group should write at once to the local Red Cross Society, enclosing the full text of this resolution, and offering to address the members on the subject of Esperanto and to instruct a Red Cross class if desired.

Propaganda Kunveno en Sidnejo.

La deksekan de majo okazis ĉe la kunveno de la departemento de instruado la unua de serio da preparoladoj pri Esperanto, okazontaj sub la protektado de la Sidneja Esperanto-Societo je la tria lundvespero en ĉiu monato.

Malgraŭ pluvego ĉirkaŭ sesdek personoj ĉeestis.

La prezidanto de la kunveno estis S-ro Mark Gosling, parlamentano, kiu malfermis la kunvenon per kelkaj vortoj bone elektitaj kaj gajhumoraj. Poste li prezentis S-ron Jolliffe, D.B.E.A., la prezidanton de la Sidneja Esperanto-grupo, kiu parolis pri la deveno kaj la kreskado de la esperanto lingvo.

Post tio S-ro Taylor kantis esperante la kanton "Anjo Loro."

Tiam S-ro Bennett parolis pri la strukturo de nia lingvo kaj penis per elmontro sur nigra tabulo klarigi al la neesperantistaj ĉeestantoj la facilan lerneblecon de tiu lingvo.

Sekvis mallonga teatraĵo, nomata "Cindrulino," ludata de la plijunaj anoj de la grupo sub la reĝisorado de F-ino Lee. La skribanto ne sin sentas kapabla por kritiki aŭ la ludadon aŭ la vestaĵojn de la geaktoroj, kaj tial sin kontentigas diri, ke saĝne la tuta aŭdantaro ĝuis tiun teatraĵon.

La vespero finiĝis per monkkolekto.

Parlamentaria Kandidato Favoras.

Sinjoro Sidney McHeigh, el Quorn, kiu estis kandidato por la Sud-Aŭstralia parlamento, skribis al AEA, ke li plene favoras la uzadon de Esperanto, kaj faros sian eblon por disvastigi ĝin en ĉiuj rondoj.

Balo en Melburno.

Tre agrabla kaj sukcesa balo okazis en Melburno je la 12-a de majo, kiel adiaŭna festo por tri Melburnaj samideanoj (sinjoroj Pyke, Rawson kaj Hudson), kiuj vizitas Eŭropon kaj la 13-an Kongreson en Praha.

Estis kelke da belaj fantaziaj kostumoj, laŭ naciaj tipoj, por esprimi la internaciecon de nia movado, kaj la balsalono montris belan scenon. La dancado daŭris ĝis malfrue... aŭ frue!... kaj la ĉeestantoj esprimis grandan kontenton.

Kroniko.

Melburno, V. — Melburnaj anoj bedaŭros la foreston de sia agemamsideano, S-ro A. Maurice Hyde, Prezidanto de la A.E.A. kaj V.D. de U.E.A. S-ro Hyde devis iri al Rabaul kiel oficisto de la Registara stabo kiel reprezentas Aŭstralion, sub la mandato de la Ligo de Nacioj. Ni esperas ke post nelonga tempo, ni ricevos de li interesan artikolon por la "Suda KrucO."

Profesoro Meredith Atkinson profesoro de Sociologio en la Universitato de Melburno, baldaŭ vizitos Eŭropon. Li ekvojaĝos per vaporŝipo Omar, ĉirkaŭ la 10-an de Aŭgusto. Profesoro Atkinson vizitis Francion, Belgion, Germanion kaj Eble, Polion, celante la studadon de ekonomiaj, sociaj kaj politikaj problemoj en tiuj landoj. Poste, li iras al Usono. Ĉar Profesoro Atkinson estas fervora subtenanto de Esperanto, kaj mem lernis ĝin, ni esperas ke Esperantistoj en la supraj cititaj landoj nepre aranĝos renkonti lin kaj fari el Esperanto veran helpilon en liaj enketoj.

Wellington, N.-Z. — Ĝus starigas en Wellington nova grupo, "The Wellington Esperanto Magazine Club," kiu celas ebligi ĉiun neriĉulon Esperantistan (preskaŭ ĉiu esperanta entuziasmo estas tia) ricevi ĉian Esperantan gazeton de la mondo. Nova kurso estas komencita. Oni celas instrui la lingvon per special-sistema deksemajna kurso. Gvidas ĝin S-ro Victor L. M. Daniel.

Sidnejo, N.S.-K. — S-ro George Gordon instruas kurson konsistantan el kvin Statalernejoj instruistoj.

Aŭstralianoj c'e la Praha-Kongreso.

La 18-an de majo foriris al Eŭropo tri agemaj membroj de nia Aŭstralia movado, kiuj projektas vojaĝi en diversaj landoj per Esperanto kaj poste ĉeesti la 13-an internacian Kongreson de Esperanto en Praha (Ĉeĥoslovakujo), sinjoroj P. T. B. Hudson, J. G. Pyke kaj R. R. Rawson. La tri sinjoroj estas bone konata ne nur en Melburno, sed ankaŭ inter la tuta Aŭstralia Esperantistaro, kie koraj bondeziroj pri feliĉa vojaĝo kaj sekura reveno akompanas ilin dum tuta ilia longa migrado.

Cina Ligo Akceptas Esperantistojn.

La Ĉina Nacia Ligo de Sidnejo, kiu jam montris sian favoron al Esperanto, antaŭ ne longe sendis afablan inviton al la prezidanto kaj sekretario de la Sidneja Esperanto-societo ĉeesti gravan feston de la Ligo.

La samideanoj, kiuj rememoras la gastaman akcepton de la tria Esperanto-Kongreso ĉe la Ĉina nacia kongreso, alte satos ĉi tiun novan esprimon de simpatio por nia lingvo.

In Russia.

Though news of the Esperanto movement in Russia is not always reliable and often contradictory, a recent report indicates that the government is earnestly forwarding the study of the international language.

According to Geneva "Esperanto," well known as a reliable authority, the commissaries for education have published an edition of 30,000 copies of the standard Esperanto text-book of Messrs. Cart and Pagnier.

In Belgian Universities.

In "Belga Esperantisto," which has now made a welcome re-appearance, we read that the universities of Ghent and Liege have both sanctioned the holding of Esperanto classes within the university—a sign that Esperanto is regarded as a matter for serious attention. The classes at Liege university are under Commandant Raulier, a well-known Belgian advocate of Esperanto.

Municipal schools at St. Gilles and Ledeborg have also included Esperanto in the curriculum.

Lord Robert Cecil on Esperanto.

The representative of South Africa at the League of Nations' assembly, Lord Robert Cecil, at a recent meeting in England was asked his opinion as to the use of Esperanto at international congresses.

Lord Robert said that he used to think that Esperanto was a joke, but now he was inclined to think that he was wrong. He would be very glad to see it in Europe, and he hoped that those in favour of it would not be discouraged by anything which took place at the assembly, but would

work hard to press their view on the world.

Such a universal language, concluded Lord Robert, would very materially assist the usefulness of the League of Nations.

Esperanto kaj Komerco.

Inter la post militaj problemoj estas la solvo de la malfacilaĵo, renkontita de ĉiu komercisto kiu faras negocojn alilande, la malsamaj lingvoj. La neceso por facila internacia lingvo, taŭga por komerco pli profundiga, kaj pli progresemaj firmoj, en sia peno trovi rimedon provis la utilecon de Esperanto. En Eŭropo estas multe da firmoj kiuj jam korespondas kaj multe uzas ĝin kaj ofte oni legas raportojn pri ĝia efiko kaj sekve la sukceso de Esperanto kiel Komuna Komerca Lingvo. Kvankam la nombro de uzantoj kreskas, estas multe da komercistoj kiuj aŭ scias nenion, aŭ estas skeptikaj pri nia lingvo kaj estas la celo de samideanoj en multoj landoj propagandi, kaj konvinki la skeptikulojn ke Esperanto ja estas vivanta kaj taŭga lingvo. Por realigi ĉi tiun celon stariĝis en diversaj landoj Komunaj Komercaj Lingvaj Komitatoj kaj antaŭnelonge simila komitato stariĝis en Aŭstralio konsistanta el sro Tilbury (Prez.), sro A. R. Cohen (Hon. Sek.), kaj sro. C. Kelly el Melburno kaj sro. P. Pfahl el Sidnejo. Ĝis nun la komitato povis fari nemulton sed ĝi jam preparas la vojon. Ĝi celas propagandi la komercajn ĵurnalojn, kaj organizaĵojn kaj helpi ĉiujn internaciajn negocojn. Anoncoj aperis en la Internacia Komerca Revuo kaj kiel rezulto korespondaĵo jam venis de aliaj landoj pri diversaj komercaĵoj. La Naciaj Specimenaj Foiroj en Eŭropo sendis al ni siajn presaĵojn kun peto represi ilin en niaj naciaj gazetoj. Bedaŭrinde, pro nia malproksimeco ili alvenas tro malfrue esti frukto-donaj laŭ la vidpunkto de la organizantoj de la foiroj sed estas utile montri ke oni uzas Esperanton. La plej interesa afero estas ke oni raportas ke la reklamado en Esperanto sukcesas en multaj lokoj pli ol la oficiala nacia reklamado.

Kelkaj el la Aŭstaliaj gazetoj ricevis de ni cirkuleran leteron kaj tradukaĵon pri komercaj aferoj kaj

la "Australasian Manufacturer" presas artikolojn kaj leterojn en preskaŭ ĉiu eldono. Oni sukcese aranĝis pri daŭra interŝanĝo inter tiu gazeto kaj la I.K.R. kaj tio devus helpi nin. La Komitato ĉiam estos preta helpi niajn komercistojn kaj ŝatus aŭdi de ĉiu pri interesaj aferoj aŭ proponoj. Ni kredas ke se la komercistoj bezonas kaj postulas Esperanton la edukadaj aŭtoritatoj plenumos tiun postulon, kaj jen la sukceso de Esperanto kiel Komuna Komerca Lingvo.

Ni ĉiuj laboru kune. A.R.C.

Gravega Decido.

La Ĝenerala Asocio de Inĝenieroj de publikaj Laboraj kaj de la Ŝtato, kaj tiu de Inĝenieroj de la Pariza Urbestro, ĵus decidis:

"Ni estas konvinkitaj, ke akcepto de helpa lingvo Esperanto por la internaciaj rilatoj havos gravegajn sekvojn, speciale de la vidpunkto por la progreso de la tekniko, permesante vastigi la konon pri la franca tekniko ekster Francujo, kaj sekve, vastigi la agadkampon de la francaj teknikistoj alilande.

Ni voĉdonas:

1.e Ke oni enkonduku instruon de ĉi tiu lingvo, majstra verko pro logiko kaj simpleco, almenaŭ fakultate, en la programoj de la publikaj lernejoj kaj en tiuj de la teknikaj kaj specialaj lernejoj;

2.e Ke, por la internaciaj Kongresoj, estu adoptata kiel oficiala lingvo, samrajte kiel naciaj lingvoj, ĝis kiam la sperto konfirmu ke ĝi estas kapabla esti la sola oficiala lingvo;

3.e Ke la direktoroj de teknikaj kaj sciencaj eldonoj kaj Revuoj atentu pri la profito de ili atingota per uzo de ĉi tiu lingvo por siaj eldonataĵoj distinitaj al aliaj landoj;

4.e Ke, dume, la teknikistoj sin metu en kondiĉojn utiligi ĉi tiun lingvon por siaj rilatoj kun fremdaj kolegoj, kaj konigu al ĉi tiuj tuj, ke ili estas pretaj uzadi ĝin;

5.e Ke la Asocioj de teknikistoj entreprenu formadon de vortaroj pri siaj specialaj fakoj teknikaj esperante.

Pro ĉi tiu lasta punkto, la du Asocioj nomis Komisionojn por fari ĉi tiun laboron.

Recenzo.

English-Esperanto Dictionary Fleming Fulcher, D.B.E.A., Bernard Long, B.A. (Camb.) donita de E. Marlborough and Co. 51 Old Bailey, London, E.C.4. Prese oni mendas rekte de la Brita Esperantista Asocio, 8 ŝilingoj (supra laŭ brita valoro), afrankite.

En ĉi tiu leksikono la kompilinto celis provizi skribantojn kaj lantojn de Esperanto kun plej vortaro de ĉiuj vortoj, kiuj en ordinara praktiko estas necese. Samtempe ili deziris ne fari la libron tro ampleksan.

La libro enhavas pli ol 30,000 vortojn, sed efektive ĝi klarigas grandan nombron de anglaj vortoj. Superflua estus la enhavigo de ĉiuj metitaj vortoj regule devenantaj komuna radiko.

Speciala plibonigo estas la metodo por montri la precizan signifon de tiuj Anglaj vortoj kiuj havas pli unu signifon. Ekzemple la vorto "discharge" havas ok Esperantaj ekvivalentojn, "stay" havas naŭ, "stop" dektri. Tiu aranĝo estus tre helpa por alilingvanoj kiuj studas anglan.

La vortaro estas tre riĉa je teknikaj esprimoj. Ĝia enhavo estas tute fundamenta, krom ok paĝoj de neologismoj. Sen ia dubo oficialaj vortoj longe estis deziritaj por ĉiuj tie traktataj, kaj laŭ nia opinio, per diskuto kaj provo de la Esperantaro, la uzado sankcios la plej multajn el la novaj vortoj.

La libro estas bele presita, s bona papero, kaj nia trarigardo sukcesis trovi preserarojn. Anglaj Esperantistoj estas feliĉaj havi ĉi tiu dispono tiel altvaloran gvidilon kiel la English-Esperanto Dictionary.

(C.W.B.)

La fonto de la Blankpiedulo (Petko R. Slavejkov). Tradukis bulgara lingvo A. T. Atanas Kolekto "Bulgara Bukedo." n-ro Prezo 8sd (0.20 fr. svisaj).

Ĉi tiu poemeto havas temon per mem tute internacian, — fantomo kiu vizitadas kaj protektadas la bone konatan orientilon. La kreinto ekzistas de la tempo kiam ĉiu ankaj rivero havis, laŭ popola fantomgardiston, kaj donis multe da historiaj tradiciaj. Kunmetu ĉi

torion de la ideala sed malfeliĉa amo de du junaj vilaĝanoj, kaj la poemo interesas ĉiujn; ne estas necese esti Bulgaro por ĝin sati. La mallongeco de la poemo ne tro grandigas la temon; la ritmo plaĉas al la orelo, kaj la vortoj bone esprimas la atmosferon de la historio.

(B.C.B.)

Here and There.

We have noticed in various journals the statement that the Melbourne Chamber of Commerce makes official use of Esperanto, but this statement, we regret to say, is inaccurate. However, we are not without hope that the many advantages that Esperanto offers to commercial men will be realised in the near future by the Chambers of Commerce throughout Australia. In the meantime the services of the Common Commercial Language Committee (Post Office Box 731), Melbourne, are at the disposal of our friends abroad, on whose behalf the committee is willing to prosecute any commercial inquiries.

The Educational authorities of the Canton of Geneva have decided to include Esperanto as a compulsory subject in all the elementary schools in the Canton after September this year. As the Eccles experiment showed that children were able to learn Esperanto with ease, and soon became much interested in it, we are sure that a similar result will be attained in Switzerland.

In our last number we referred to the resolution of the Paris Chamber of Commerce expressing the wish that Chambers of Commerce in all countries should support the instruction and use of Esperanto. We are now able to report that the following Chambers of Commerce use Esperanto, when necessary, in correspondence, viz.: London, Paris, New York, San Francisco, Buenos Aires, Barcelona, Sabadel, Lisboa, Arras, Abbeville, La Rochelle, Laval, Rennes, Puy, Krakow, Kassel, Bromberg, Karlsruhe, Leipzig, Dresden, Plauen, Schweidnitz, Leignitz, Reichenberg, Olomouc and Locarno.

Tuj post la fino de la unversala kongreso en Praha okazos en Graz, Aŭstrujo la internacia katolika kongreso 8-12an augusto 1921. Krom la ĝenerala problemo de la nuntempa

internacia agado pritraktota dum la ĝenerala parto de la kongreso oni intencas aranĝi specialajn konferencojn por la diversaj fakoj de la vivo katolika, ekz. por la junula, studanta, virina, laborista, porpaca, esperanta k.t.p. movado.

La Internacio Katolika, fondita en Hago, agosto 1920, kun grandega sukceso uzadas Esperanton kiel sian oficialan lingvon internacian. En pli el 20 ŝtatoj ĝi havas naciajn direktorojn, en aliaj reprezentantojn. La tuta internacia organiza kaj interkomunika laboro fariĝas nur en Esperanto.

La "Hungara Esperantisto" Societo Laborista" malgrau la malbona situacio tiel forte propagandas nuntempe kiel neniam ĝis nun. En la plej multaj laboristaj societoj kaj hejmoj ekzistas Esperantaj kursoj. La nombro de la anaro plimultiĝas. Energie oni laboras ankaŭ por la intereso de Budapeŝta post kongreso.

La "Infanamika Societo" oficiale petis de la centro la aranĝadon de Esperantaj kursoj por la infanoj kaj la tuta gvidantaro de supre nomita societo decidis ellerni Esperanton. Tiu-ĉi decido estas preskau la unika en Esperantaj rondoj.

La Esperanto-muzeo kaj biblioteko en Saratov havas nelimitajn sumojn je sia dispono. La lasta Tutruslanda kongreso de arto akceptis unuvoĉe Esperanton por siaj interrilatoj. La registaro de la Kirgiza federativa respubliko en Orenburg subtenas ĉiufanke nian movadon. En Kaŭkazo oni vigle laboras. Dum la pasinta duonjaro estis ekzamenitaj ĉe la Centra Kaŭkaza Esperantista Komitato preskau 800 da personoj. Organizaĵoj esperantistaj ekzistas en jenaj kaŭkazaj lokoj: Anap, Armavir, Baku, Groznoe, Gelendlii, Jejsk, Jekaterinodar, Jelizavetpole, Kislovodsk, Majkop, Nalĉik, Novorosijsk, Soĉ, Tiflis, Tuapŝe kaj Vladikavkaz.

Ni legas pri multnombre vizitataj esperantaj kursoj por ruĝarmeanoj en Moskvo, Petrograd, Kronŝtadt, Saratov, Ĉerepovec, Jekaterinodar, Odesa, Perm, Barnaul, Omsk, por poŝtistoj en Ĥerson, Vitebsk, Tambov, Omsk, por fervojistoj en Jekaterinodar kaj pri aviadistoj en Kazanĵ lernataj nian lingvon. Ni ekcias pri la Konferenco de rusaj esperantistoj okazinta de la 2 gis 5. de oktobro

1920 en Nijnij Novgorod. Ĝi decidis prepari la IIIan Tutruslandan kongreson de esperantistoj, kunvokotan ĝis la 31. de majo 1921 en Moskvon. En Vitebsk ekzistas "Strato de Zamenhof" kaj "Strato Esperanto."

La "Evening Post" de Novjorko Majo la 12an, 1921, publikigis grandan artikolon pri Esperanto, skribita de S-ro J. D. Sayers, unu el la plej aktivaj tieaj Esperantistoj. La artikolo estis nomita:

ESPERANTO IS GROWING IN WORLD-WIDE FAVOR.

War advanced cause of International Language as a weapon with which to abolish wars. Tenth Congress, this year.

Tiu ĵurnalo promesis publikigi ĉiusemajne artikolojn pri Esperanto kaj tio certe estas tre grava propagando, ĉar tiu ĵurnalo estas tre multeacetata de la publiko kaj estas unu el la ĉefaj en Novjorko.

Thomas Alva Edison diras: "Mi neniam vidis knabon kiu ŝatas iri al la lernejo kaj li neniam ŝatos ĝin ĝis la tempo kiam oni ŝangos la instruadmetodojn. Oni instruas per vortoj anstataŭ per okuloj, uzante movantbildojn (Kinematografo).

Antau nelonge mi paroladis al infanoj kun la helpo de movantbildo kaj ili komprenis la ĥemiistan principon kiun mi volis klarigi, kaj ili estus aŭdintaj min la tutan nokton se mi ĝin volus.

A Practical Use of Esperanto— and Its Result.

The central Schools Committee of Antwerp recently arranged an international inquiry into the laws for compulsory school attendance in various countries, for which it made use of Esperanto.

Replies were received from thirty different countries and provinces.

The committee was impressed with the practical usefulness of Esperanto, and expressed the desire to the Antwerp town council that the question of introducing Esperanto into the municipal day and evening schools should be considered.

The committee also decided to publish in Esperanto (as well as in Flemish and French) its report on the replies received from abroad.

Vespero en Stambulo.

De I. Naj'ivin.

... Sur mallargá tuteluzita milionoj da piedoj ŝtuparo, trafante interne de la dika ŝtona muro, konstruis Ĝenovanoj, mi suriras al supro de Galata turo. Alta, silenta, turko paŝas antaŭe, lumigante kandelpeco la duoneruiniĝintajn malglatajn ŝtupojn. Sed jen ni estas al la supro... Mi donacas bakŝis al la gvidisto kaj montras per gestoj al li, ke mi deziras resti sola. salutas, almetante la manon al frunto, kaj foriras.

Kia luksa, kia neordinara pentra malvolviĝas antaŭ mi! Tro majesta tro beleĝa, ĝi malsimilas al la realaĵoj ĝi estas por la okuloj iluzio tuj maperonta, ĝi estas revo de iu dio, estis sorĉaĵo...

Rekte antaŭ mi — la malluma mistera Stambulo. Sur la delikata rozkolora fundo de ĉielruĝo kiel Marmora Maro, nigraj pro mallumo de l' vespero moskeoj kun sia kvazaŭaeraj minaretoj konturiĝas per siaj strangaj dentigaĵoj, per sia mirinda punto. Jen malklare blanka inter cipresoj la kioskoj de l' Serajlo; jen la amasego de Aja-Sofia altiĝas, nemalproksime de ĝe estas la malluma gracia silueto de moskeo de Aĥmedo, tie la turo de l' Seraskirejo (Milita ministrejo) fiere celas la rozkoloran ĉielon, tie la moskeo de Bajazeto, tie la belulino "Sulejmanija Dĵami," apud kiu brilas fajretoj en la palaco de Ŝejk-Uhl-Islamo, la Estrado de l' mahometana mondo. Tie pro malproksime estas vidataj la mallumaj gajaj vicoj de malnovaĵ akvokonduktiloj, kaj poste — la senlima malluma malproksimaĵo.

Super Stambulo estas rozkolora oro de l' estingiĝanta suna subiro sub Stambulo — viva, brile fluant, argento de Ora Korno, lumigita de l' plena luno. Kaj en tiu ĉi fluida argento, kiel fabelaj monstroj moviĝas mallumaj siluetoj de vaporsipoj kaj malrapide naĝiras orkoloraj smeraldaj, rubenaj stelaroj de iliaj signalaj fajroj. Jen malluma nubeto ŝirmis la lunon, Stambulo malaperis tuj, kiel iluziaĵo. Ora Korno malheliĝis, kaj restis nur tiuj diverskoloraj stelaroj de la tero, malrapide naĝantaj tie malsupre. Maldensigita la malluma nubeta vualo, kaj ree la argentsimilaj lumradioj de la luno

ekversigis sur la teron, ree aperis Stambulo el la mallumo kaj ree fajreroplana fariĝis Ora Korno... Kaj subite strangaj longnotaj kvazaŭ ĝemantaj sonoj ekbruadis de ie. Kio estas? Mahometana pastro, kies nigra silueto estas vidata tie, sur la punto de najbara moskeo, kontraŭ pale-orkolora strieto de l' ĉielruĝo, alvokas la fidelulojn al la preĝo. Ĝi estas la sola sono, leviganta ĝis mi de la tero, sed ĉu estas tera sono? Silentiĝis la pastro, kaj ree ĉio estas senbrua, ĉio silentas, kvazaŭ timante per plej mallarĝa brueto fortimigi la revaĵon de la nokto, la mirindan urbon, malaperigi tiun ĉi iluziaĵon.

Malsupre sub mi, estas Galato, superversita per fajroj. Ĝiaj nealkuleblaj domoj dekurantaj de supro malsupren al la bordo de Ora Korno por enigardi ĝian fajrerantan sorĉan profundon, ŝajnas ĉe la luna lumo masivaj fandaĵoj de arĝento. Per mia lorno mi trovas mian gastdomon. Sur ĝia plata tegmento, sub reto de vinberujo, estas malklare vidata izola malluma figuro de monaĥo... Kiom da malgajeco, da silenta melankolio estas en ĉi tiu senmova nigra figuro, superversita de luna arĝento! Li rigardas la maran malproksimon, kie levigas principaj insuloj, konfuze vidataj kaj belegaj, kiel unua ekscitiĝo de amo, li rigardas la profundajn de la ĉielo, tremetanta en la lumo de brilantaj steloj, li observas malrapide malaperantan en malproksimo fajreton de vaporŝipo, kaj en lia animo sin levas, eble, la nubeto de sopiro pri la pasinteco, ekflamiĝas, eble, tie la bruliga fajro de bedaŭro pri la forlasita mondo, aŭ, eble, furiozas en tiu ĉi solula animo la deziro al amo kaj feliĉo, la frenezo varmega kaj pasia, kiel suda fulmotondro... Aŭ, eble, li estas feliĉa pro sia soluleco?... Mi ne scias, sed lia malluma senmova figuro sole malgajigas la solenecon de la nokto...

Ankaŭ pli malproksimen mi rigardas, kie, simile al miloj da falintaj el la ĉielo steloj, brulas la fajretoj de Skutari, kie, kvazaŭ la pasioplana Antareso, brilas la ruĝa Leandra lumturo. Tie, en la mallumo de l' nokto, sin kaŝis Azio, malhela kaj mistera, kiel nokto, kiel enigmo de sfinkso.

Azio!... En ĉi tiuj kvar literoj estas entenita io tiel senlima space kaj tempe, ke la penso perdiĝas, kiel la lumo de la jena lumturo sin perdas en la senlimeco de l' nokto.

Azio, la lulilo de l' homaro; Azio, kie unuafoje, kvazaŭ timema lumero, ekflamis la homa intelekto, kie naskiĝis la ideo pri Diaĵo, kie, kvazaŭ floro de nevidita beleco inter arbaraj dezertaĵoj, ekbrilis je la unua fojo la senmorta belegeco en la himnoj de Rig-Veda; kie ekŝprucis la fontoj de ĉiuj religioj; Azio, la senfina tombejo de popoloj, iam grandaj, nun malaperintaj senpostsigne; Azio, la patrujo de l' sovaĝamasegoj da vagantoj, superversintaj la teron per maroj da sango; la patrujo de Sakia Muni, Konfucio, Zoroastro, Jesuo, de la grandaj instruintoj pri l' amo; Azio, la lando de malklereco, sklaveco, fanatikeco, alta saĝo, — la kampo, tutsemite iam per la floroj de l' amo; la kampo, kie kreskis glavoj sango-kovritaj... Kaj ĉio ĉi granda, teruranta, forpuŝanta, ĉarma, premanta, — ĉio ĉi rigardis min per miloj da fajrokuloj el trans la arĝentsajna vojo de Bosforo. Mi demandis la giganton pri ĝia mistero, pri tio, kion ĝi pretigas al la mondo, sed ĝi silentis...

Mi malsupreniris pli malalten, kaj konfuza bruado de l' vivo atingis min... ankoraŭ pli malsupren, kaj la ondoj de l' vivo ekkuregis preteren, plenaj je forto, pelataj ĉiam antaŭen de nemalfortiĝanta vento de iluzioj kaj esperoj. Sed mi estas ĉiam sur la turo, ĉiam ankoraŭ super la vivado, super la homoj... Kiom belaj ili estas de ĉi tie, kiom helkoloraj! Kiom ili svarmas sur ĉi tiuj mallarĝaj stratetoj, kiom bruas, kiom furioziĝas! Intersovaĝa blekego, surdiga bojado de vekiĝintaj al nokto sennombraj hundoj atingas min jen helvoĉaj, simile al raketo, sonoj de orkestro, jen eksplodo de ridego, jen malespera kolerema insulto, kiel malbelega sorĉistino, preterflugas min, jen krio pri helpo disŝiras la noktmallumon... Poste ree ĉi tiu egaltona konfuza bruado de l' homa maro... Jen el ĝiaj ondoj, el la mallumo, elŝiriĝis, kiel fulmoj el nubego, helaj, akraj sonoj de trumpetoj kaj bruego de tamburoj, — eble tio estas soldata vesperkanto. Jen ie tute proksime, malsupre, juna alttenoro ekkantis sopireman kanton

pri io. Li plendis al la steloj, kaj ĉirkaŭe boladis la vivo, plena je rido, je malsobrolaj krioj, insultadoj, radfrapado, virinaj ekĝemoj. Kaj subite furiozaj, plenaj je bruliga pasio muziksonoj kiel uragano sin ekportis preter mi en la arĝentkoloran krepuskon de la nokto. La kordoj de muzikiloj, la voĉoj de kantistoj ploregis, ekkriis akre, ĝemadis, sprucigis pluvegon da frenezaj triumfantaj sonoj, ridegis kaj ree ploregis. La sovaĝaj krioj de l' dancanta homamaso, ritmita piedfrapado kaj hundblekego ankoraŭ plifortigis la brulan ĉarmon de tiu ĉi orienta melodio, plena je flamo, pasio kaj peko...

Alte en la ĉielo, inter la steloj, sur la blanka punto de minareto, denove montriĝis la malluma figuro de pastro. Li ree memorigas al la fideluloj pri preĝado... Fluaj, sopiremaj, puraj kiel arĝento, sonoj ekversigis sur la teron el la supro de l' minareto; renkontiĝantaj tie kun la ventego de pasio kaj gajeco de la homa maro, ili senforte baraktis, tremetis super la tero, kvazaŭ timigitaj birdoj, kaj ree flugis ĉielen, ĉiam same puraj kaj malgajaj... Kaj la steloj, aŭdinte, ke sur la tero "nenia diaĵo estas krom Dio," ekruĝigis pro senlima ravego kaj plenigis la noktan arĝentluman senfinecon per harmoniplenaj himnoj al la Kreinto de l' Universo...

El la Rusa lingvo tradukis

A. Vejtcler.

Gazetoj Ricevitaj.

Hungara Esperantisto, n-ro 4
(mankas n-roj 2 kaj 3) .

Verda Utopio, n-ro 4.

La Verda Ombro, n-ro 4.

Kataluna Esperantisto, n-ro 5.

Internacio (provizore maŝinskribita) ĉiusemajna bulteno, n-roj 23, 24, 25, 26.

Esperanta Finnlando, n-ro 4.

Hispana Esperantisto, n-ro 48.

Libero (Kioto), n-ro 9.

La Progreso (Plzen), n-roj 4, 5.

Franca Esperantisto (Paris), n-ro 5.

Le Monde Esperantiste (Paris), n-ro 2.

Nova Tempo (Vienna), n-ro 16.

American Esperantisto (Boston), n-ro 6.

Belga Esperantisto (Antverpeno), n-ro 3—4.

Flora ornamo.

Nur antaŭ apenau dek jaroj,
Sub la virgina vualo,
Kun flora ornamo en haroj,
Ŝi staris kun mi ĉe altaro.

Kaj estis senvivaj la floroj
Faritaj per manoj de l'homo
Sed ĝojis en ni niaj koroj
Malgrau de la vintra malvarmo.

Kaj nun, post apenau dek jaroj
Kaj preskau en sama ornamo,
Kun floroj vivplenaj en haroj
Revenis ŝi al la altaro.

Por volo mistera de l'sorto
Ŝi kuŝas malviva en ĉerko
Kaj ploris mi, ploris eterne senforta
Sed ĝojis la verdo de Majo.

Romano Frenkel.

Malfrua Somero.

Dolĉa ripozo, kviete silenta,
regas denove en mia kor'
kaj la doloro, kruele turmenta,
pro via amo jam flugis for.
Eble lastfoje ekbrilis la suno,
eble nur laste... neniam plu
lasis momente for min la autuno
ridas je mi la ĉiela blu...!!

Kiel ajn estu mi tamen aklamas,
eĉ se mensoga la koramem',
kiun vi sentas, de kiu ekflamas
via koret'... Mi amas vin mem!
Ridu vivige, amegu konsole,
kisu, kisadu min arde nun!
Spite la vintro — somero nur sole
estu en koroj, ho mia sun'!!

J. Baghy.

Steloj.

Ho jen unu stelo, du steloj:—
Flava krizantem' en ĉielo!
Ho por kiu ci elfloriĝis,
En la noktomezo malluma?

Tradukis J. Hirano.

Rimitaj proverboj.

Estas la mallaboremo,
de ĉiuj malvirtoj la semo.

* *

Kvankam la juneco pasas,
kato tamen musojn ĉasas.

* *

Kiu bezonas,
leĝon ne konas.

Diplomata Babelo.

Tre interesan studon pri "la Kvar Granduloj de la Packonferenco" verkis S-ro Lansing, eks-statsekretario Usona. En la parto dediĉita al Prezidinto Wilson, S-ro Lansing rakontas, ke en la komenco la kvar statviroj kunvenadis solaj. S-ro Orlando ne komprenis la anglan lingvon, dum S-roj Wilson kaj Lloyd George konis nekomplete la francan. Nur S-ro Clemenceau scipovis ambaŭ lingvojn. Oni do petis la helpon de interprestisto, sed li ne bone sukcesis kaj baldaŭ tri sekretarioj, — franca, brita, itala — lin anstataŭis. S-ro Wilson restis sola por Usono. Tio, kompreneble, ne estis senriska metodo por bone pritrakti tiel multajn kaj malsimplajn demandojn.

Jen grava elmonro de la rifo!

Ĉu ni, Esperantistoj, ne rajtas diri, ke ĝi estus malaperinta, se oni estus uzinta nur unu lingvon, la nian?

NOVA TEMPO

La mezeŭropa esperanta kulturgazeto; sendependa.
Ankaŭ je VIA dispono.

Sendu 4s./6p. al Box 1367, Eliaz-
betr-str: P.O., Melbourne.

Vitold Tennisov, Barnaul, Siberio, Pavloskaja 82, deziras korespondadi letere. p. k. il.; ĉiam respondas; Kolektas poŝtmarkojn, insektojn k. t. p.

F. F. Carvalho, Calçada de S. Vicente, 21, Lisbon, Portugalio, deziras korespondadon per p. i. ĉiam respondos.

Sinjoro K. Koblov, Timerjazevskij 50, Kv. 3, Tomsk, Siberio, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj il. PK-jn (sed volas ricevi nur zoologiajn PK-jn).

Finnish Government's Subsidy to Esperanto.

Esperanto journals to hand contain interesting accounts of the debate in the Finnish parliament on the budget item, "Subsidy to the Finnish Esperanto Association: 25,000 marks," which appeared under the heading of subsidies to literary, scientific and art societies.

Fourteen members showed unexpected interest in the question of financial help to an international language, which was a refreshing change from the wilderness of figures through which they had been wading.

Some very old arguments against Esperanto were brought forward, and in answer some very new and striking evidences of the progress of Esperanto in various countries were presented.

Eventually the house decided to pass the item, thus giving to the Finnish Esperanto Association valuable moral support as well as the financial help of 25,000 marks towards the year's expenditure.

Blinda samideano deziras korespondantojn. ĉu blindajn. ĉu ne. Leteroj estu brajlaj aŭ nigraj. Sinjoro Lichtenstadt Estvan, Vecses, Pest-Megye (Hungarujo).

Filatelistoj: Sendu al mi 100.500 poŝtmarkojn (ankaŭ pli multe de unu speco) de via lando, kaj mi sendos tuj al vi la saman valoron de Ĉeĥoslovakio. Solida agado garantita. Aldonu respondukuponon! Josef Purnr, instruisto, Hradec Kralove II (Ĉeĥoslovakio).

S-ro B. Wulc, Radom, Poland, Lubelska, 30, deziras interŝanĝi p-markojn. Por 100 p.m. Aŭstraliaj, li sendos tian saman kvanton da Rusaj, Ukrainaj, aŭ Polaj p-markoj.

Deziras korespondantojn S-ro A. Silkl, Yieui, Husova 324, Ĉeĥoslovakio.

Ilustritajn poŝtkartojn, albumojn de urboj kaj gazetojn utiligeblajn dum la lernejo geografia kaj historia instruado deziras interŝanĝi faka instruistino. Fino Julie Supichova (del. de U. E. A.), Praha II., Mala Štěpanska 6, (Ĉeĥoslovakio).

Subscriptions to

"La Suda Kruco"
(second year),
Are now due.

La Fortuno de Marteno Valdek.

La izolejoj de la arbaro Harza, en Germanujo, sed speciale la montaroj nomataj Blokbergo, aŭ pli ĝuste, Brokenbergo, estas ideala scenejo por romanetoj pri sorĉistinoj, demonoj kaj fantomoj. La okupado de la loĝantoj, kiuj estas aŭ ministoj, aŭ arbaristoj, estas tia, ke ĝi faras ilin neordinare inklinaj al superstiĉo, kaj la naturajn fenomenojn kiujn ili vidas dum la plenumo de sia soleca aŭ subtera laboro, ili ofte atribuas al la intermetado de koboldoj aŭ al la povo de la magio.

Inter la diversaj legendoj ekzistantaj en tiu sovaĝa regiono, plej amata estas unu, kiu pretendas ke la Harzo estas vizitata de speco de protekta demono. Tiu havas la ŝajnon de sovaĝa viro de giganta staturato, kies kapo estas kronata per kverkaj folioj kaj lia lumbo same zonata. En la mano li portas pinarbon eltiritan kun ĝiaj radikoj.

Estas fakto, ke multaj personoj asertas, ke ili vidis tian formon marŝantan per gigantaj paŝoj laŭlonge de la kontraŭa supro de monto, en linio paralela al sia progresado, kiam apartigas ilin nur malvasta valo; kaj pri la realeco de la aperado oni ja tiel ĝenerale konsentas, ke moderna nekredemeco, nur trovas rifuĝejon atribuant ĝin al optika tromplogo.

En antaŭaj tempoj, la kunesto de la demono kun la loĝantoj estis pli intima; kaj konforme kun la Harzaj tradicioj, li kutimis, laŭ la kaprico ĝenerale alŝiksit al tiaj ternaskitaj povuloj, intermeti sin en la aferoj de la homoj, kelkafoje por ilia bono, kelkafoje por ilia malĝojo.

Certe estas, ke eĉ liaj donacoj ofte fariĝis fine fatalaj al tiuj por kiuj ili estis faritaj, kaj estas nemalofa afero por la pastroj, en ilia zorgo pri iliaj kongregacioj, veki longajn predikojn, kies temo estas averto kontraŭ ia kuniĝo, rekta aŭ norekta, kun la

Harza demono. La fortuno de Marteno Valdek estas ofte citata de maljunuloj al siaj senprudentaj fanoj, kiam ĉi tiuj mokas danĝer, kiu ŝajnas nereala.

Vaganta kapuceno, aroĝinte al la pupitron de la pajlotegmento, preĝejo en malgranda vilaĝo nomita Morgentrodt, lokigata en la Harza regiono, el ĝi predikis kontraŭ pekaj de la loĝantoj kiuj havas rilatojn kun diablo, sorĉistinoj kaj feinoj, kaj speciale kun la arbara diablo de la Harzo. La doktrinoj de Lutero jam antaŭe komencis konati inter la kamparanoj, ĉar la tempoj estis dum la regado de Karolo kvinta kaj ili moke ridis la ardecon per la maljunulo insistis pri sia tempo. Fine, kiel lia fervoro kreskis rezulto de ilia kontraŭeco, tiel altiĝis ilia kontraŭeco, proporcie je lia insistemo.

La loĝantoj ne ŝatis aŭdi ke alia timigita kvietita diablo, kiu loĝas Brokenbergon dum multe da centjaroj, estas komparita kun Baŭro, Astaroto kaj eĉ Baŭl Zebub kaj kondamnita sen pardono al senfunda Tofeto. Timoj, ke la diavlo venĝus sin sur ili pro ilia aŭskultado al tiu kondamno pligrandigis ilian pri li naciian intereson. Vaganta monaĥo, ili diris, kiu estas ĉi tie hodiaŭ kaj morgaŭ for povas paroli kiel al li plaĉas, sed estas ni, la malnovaj kaj konstantaj loĝantoj de la regiono, kiuj estas lasitaj de ofendita demono, kaj kompreneble devas pagi por ĉio.

Pro la indigno kiun naskis ĉi tiu pripensado en la kamparanoj, alparis el insultemaj vortoj al Stork kaj ĵetinte multajn kontraŭ la pastro forpelis lin ekster sian regionon, ke li prediku kontraŭ demonoj aliloke.

Tri junaj viroj, kiuj ĉeestis la partoprenis en tiu afero, estis venantaj al la dometo, kie ili sekvis la laboran kaj humilan okupadon la preparado de karbo por la formo de ferfandejoj.

HAROLDO PUDNEY Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM Aŭ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Survoje ilia konversacio nature estis precipe pri la demono de la Harzo kaj la doktrino de la kapuceno. Mejksio kaj Georgo Valdek, la du plej aĝaj fratoj, kvankam ili kunplis, ke la vortoj de la kapuceno estis nekonvenaj kaj riproĉindaj, ĉar li tiel maltime aŭtoritate priskribis la veran karakteron kaj loĝojn de la fantomo, tamen ili insistis, ke ĝi estas ekstreme danĝera akcepti liajn donacojn, aŭ teni kun li rilatojn. Ili konsentis, ke la demono estas pova, sed kaprica kaj maniema, kaj homoj kiuj rilatiĝis kun li nur malofte finigis bone. Ĉu li ne donis al la brava kavaliro, Ekbert, el Rabenvald, tiun faman nigran ĉevalon per kiu li venkis ĉiujn lertulojn en la fama turniro ĉe Bremeno? Kaj, poste, ĉu la sama ĉevalo ne saltis kun sia rajdanto en abismon tiel krutan kaj timigantan, ke nek ĉevalo, nek homo, estis vidita plu? Ĉu li ne donacis al Matrono Gertrud Troden kuriozan sorĉmetodon por fari buteron? Kaj, poste, ĉu la granda krimula juĝisto ne bruligis ŝin kiel sorĉistinojn konsekvence de sia uzado de tiu donaco?

Ĉi tiuj okazintaĵoj kaj multaj ceteraj, pri kiuj ili rakontis, en kiuj malbonŝanco kaj nebona sorto finfine sekvis ŝajnajn bonaĵojn faritajn de la Harza fantomo, tute ne faris impreson sur Marteno Valdek, la plej juna el la fratoj. Marteno estis malsaĝa, senpripensa, impulsema. Li superis en ĉiuj ekzercoj kiuj apartenas al montano, kaj estis brava kaj netimigebla pro sia konstanta kunesto kun la danĝeroj apartenantaj al ili. Li ridis la timecon de siaj fratoj. — Ne parolu al mi pri tiu malsaĝeco, — li diris, — la demono estas bona demono, li vivadas inter ni tute, kvazaŭ, li estas kamparano kiel ni, fantomvizitas la solecajn elstarejojn kaj krevajojn de la montaroj tute simile al ĉasisto aŭ kaprogardisto. Kaj tiu, kiu amas la Harzo'n kaj ĝiajn sovaĝajn bildojn ne povas esti indiferenta pri la sorto de la fortikaj loĝantoj de la regiono.

Sed, se la demono estas tiel malica, kiel vi priskribas lin, kiamaniere li tenus povon kontraŭ la homoj, kiuj nur akceptas liajn donacojn ne kiamaniere jurpromesante submeti sin al lia volo? Kiam vi portas vian karbon al la forno, ĉu la mono pagata

al vi de blasfema Blejz, la maljuna sentaŭgula subestro, ne estas tiel bona kiel ĝi estus se vi ricevus ĝin de la pastro mem? Do, ne estas la donacoj de la demono kiuj endanĝerigos vin, sed estas pri la uzo kiun vi faros per ili ke vi devos liveri konton. Kaj, se la demono aperus antaŭ mi en ĉi tiu momento kaj kondukus min al orominejo aŭ argentominejo, mi komencus fosi eĉ antaŭ ol li estus turninta al mi la dorson, kaj mi konsiderus min sub la protektado de unu pli potenca ol li, dum mi faras bonan uzon de la riĉeco kiun li montris al mi. Al tio la plej aĝa frato respondis, ke riĉeco nebone gajnita, malofte estas bonmaniere elspezata, sed Marteno arogante deklaris, ke la posedo de ĉiuj trezoroj de la Harzo ne eĉ iomete ŝanĝus liajn kutimojn, moralojn aŭ karakteron. Lia frato petegis Martenon paroli pli singarde pri ĉi tiu temo, kaj malfacile sukcesis flankenpuŝi ĝin per gvidado de la parolado al konsiderado de venonta aproĉaso.

Ĉi tiu konversacio okupis ilin ĝis alveno al ilia dometo, kaduka barako lokita ĉe unu flanko de sovaĝa, malvasti kaj romantika valo, en la profundejoj de la Brokenbergo. Ili liberigis sian fratinon el ŝia laboro pri la karbonigo de la ligno, afero kiu postulis konstantan aplikadon, kaj tiam dividis inter si la devon zorgrigardi la fajron dum la nokto, ĉar, laŭ kutimo, unu ĉiam maldormis dum siaj fratoj kuŝiĝis.

Mejksio Valdek, la plej aĝa frato, zorgis la fajron dum la unuaj horoj de la nokto, kaj estis treege timigita vidante sur la kontraŭa flanko de la valo grandan fajron ĉirkaŭatan de formoj, kiuj ŝajnis rondiri ĝin groteskaj gestadoj.

Mejksio unue intencis vekti siajn fratojn, sed pripensante la aventuran karakteron de Marteno kaj sciante ke ne estus eble vekti Georgon sen Marteno, kaj pensante, ankaŭ, ke tio, kion li vidas estas iluzio de la demono, alsendita eble konsekvence de la bravaj diroj de Marteno en la antaŭa nokto, li decidis, ke pli bone estus turni sin al savigilo en tiaj preĝoj kiaj li povas balbuti; kaj en granda konsterno li rigardadis tiun strangan kaj timigantan apearon.

Brulinte iom da tempo, la fajro iom post iom estingiĝis, kaj la lasta parto de la gardotempo de Mejkso estis rimarkinda nur pro la rememoro de liaj timegoj. Georgo nun anstataŭis Mejkson, kiu iris dormi. La fenomeno de granda, salteganta fajro sur la kontraŭa deklivo ree sin montris al la okulo de la rigardanto. Ĝi estis, kiel antaŭe, ĉirkaŭata de estaĵoj, kiuj vidiĝis per siaj netravideblaj formoj, ĉar ili estis inter la rigardanto kaj la ruĝa, helega lumo, sin movis kaj kaleidoskope grupiĝis ĉirkaŭ ĝin kvazaŭ, ili partoprenis en ia mistika ceremonio. Kvankam Georgo estis egale singardema kiel Mejkso, li posedis pli maltiman karakteron ol lia pli aĝa frato. Li decidis esplori pli proksime la kaŭzon de sia mirego. Do, vadinte la rivereton, kiu apartigis la valon, li grimpis supren laŭ la kontraŭa flanko kaj alproksimiĝis al la fajro ĝis nur longo de la flugo de sago apartigis lin de la fajro, kiu brulis ŝajne tiel same arde, kiel en la momento, kiam li unue vidis ĝin.

La sintenado de tiuj, kiuj ĉirkaŭis lin similis tion de tiuj fantomoj kiuj estas vidataj dum maltrankvila sonĝo, kaj tuj pravigis la impreson, kiun li tenis de la komenco, nome, ke ili ne apartenas al la homa mondo.

Inter ĉi tiuj strangaj, neteraj formoj, Georgo Valdek rimarkis tiun de giganto kovrita per haroj, tenanta elradikitan pinarbon en la mano, per kiu de tempo al tempo li ŝajne incitis la flamantan fajron, kaj vestita per nenia kovraĵo krom girlando de kverkfolioj ĉirkaŭ la frunto kaj la lumboj.

La koro de Georgo malleviĝis en li kiam li rekonis la bone konatan aĉeraĵon de la Harza demono, kiu estis tute sama kiel tiu priskribita al li de la maljunaj ŝafistoj kaj ĉasistoj, kiuj estis vidintaj lian formon transsantan la montarojn.

Li sin turnis, kaj estis forranidonta, sed pensante plu li nomis sin mal-kuraĝulo kaj diris mense la strofon de la psalmisto "Ĉiuj bonaj anĝeloj laŭdu la Sinjoron." Kio en tiu regiono, estas konsiderata forta malsorĉigilo, kaj sin turnis ankoraŭ unu fojon al la loko, kie li vidis la fajron. Sed ĝi ne plu estis videbla.

Nur la pala luno nun lumigis la flankon de la valo, kaj kiam Georgo

per tremantaj paŝoj, kun malseka frunto kaj la haroj starantaj sub sia minista ĉapo atingis la lokon sur kiu la fajro antaŭ nelonge estis vidata montritan, kiel ĝi estis, per tordita kverkarbo, sur la herbejo ne troviĝis eĉ la plej malgranda postsigno de tio, kion li ĵus vidis. La musko kaj la sovaĝaj floroj estis tute ne bruligitaj kaj la branĉoj de la kverkarbo, kiuj ĵus ŝajnis envolvitaj en girlandoj el fajro kaj fumo, estas malsekaj je la roso de meznokto.

Georgo reiris al sia dometo per tremantaj paŝoj, kaj, rezonante, kiel lia pli aĝa frato, decidis nenion diri pri tio, kion li vidis, timante, ke li veku en Marteno tiun aventuran scivolemon, kiun li preskaŭ konsideris ligita al malpieco.

Jam nun estas la vico de Marteno prizorgi la fajron. La doma koto jam donis sian unuan alvokon, kaj la nokto preskaŭ finiĝis. Esplorinte la staton de la forno, en kiu la ligno estis metita por ke ĝi estu karbigita, li supriziĝis trovi, ke la fajro ne estis sufiĉe prizorgita, ĉar en sia ekskurso kaj ĝiaj konsekvencoj Georgo estis forgesinta la ĉefan devon de sia deĵorado.

La unua impulso de Marteno estis veki siajn fratojn, sed kiam li vidis ke ili ambaŭ dormis neordinare peze, li ne ĝenis ilin, sed li mem klopodis nutri la fornnon sen ilia helpo. Tio, kion li superŝutis sur ĝin, ŝajne estis malseketa kaj netaŭga, ĉar efektive la fajro havis pli de tendenco estingiĝi ol reviviĝi.

Marteno tiam iris kolekti el amasa kelke da branĉoj kiuj estis zorge tranĉitaj kaj sekigitaj por tia okazajo, sed, kiam li estis reveninta, li trovis la fajron tute estingita. Tiu ĉi estis serioza malfeliĉo, kaj minacis al ili la pardon de ilia vendotaĵo dum pli ol unu tago. La ĉagrenita kaj humiliĝinta observanto penis ekbruligi la fajron, sed la tindro estis malseketa kaj lia laboro en ĉi tiu provo ankoraŭ estis senefika. Nun li estis vokonta siajn fratojn, ĉar la cirkonstancoj ŝajnis gravaj, kiam ekbriloj de lumo vidiĝis ne nur tra la fenestro sed ankoraŭ tra ĉiu fendeto de la krude konstruita dometaĉo, kaj alvokis kin rigardi tiun saman aĉeraĵon, kiu antaŭe estis timiginta la sinsekvajn gardotempojn de siaj fratoj.

Lia unua penso estis, ke la Mulerbaŭseroj, iliaj metiaj kunkurantoj, kun kiuj ili jam havis multajn kverelojn, nun invadas ilian teritorion por ŝteli ilian lignon, kaj li decidis veki siajn fratojn kaj puni la en-trudantojn pro ilia maltimego.

Sed mallonga ripenso kaj observado de la gestoj kaj maniero de tiuj, kiuj ŝajnis "labori en la fajro" kaŭzis lin forĵeti tiun opinion kaj, kvankam iom nekredema pri tiaj aferoj konkludi ke tio, kion li vidas estas nenatura fenomeno. "Ĉu ili estas homoj, ĉu diabloj," diras la netimigebla arbaristo, "kiuj sin okupas tie per tiaj fantaziaj ritoj kaj gestoj, mi iros kaj demandas fajron por reŝanĝi nian fornon." Samtempe, li formetis la ideon veki siajn fratojn.

Kredo ekzistis ke tiaj aventuroj, kiajn li nun estis prenanta sur sin, estis eblaj nur por neakompanata persono. Li pensis ankaŭ ke liaj fratoj pro sia timeco eble intermetus sin por malebligi lin fari la esploron kiun li nepre decidis fari; do ekprenante sian arolancon de la muro la bravega Marteno Valdek ekiris sola al sia aventuro.

Same kiel lia frato, George, sed kun pli da kuraĝo, Marteno transiris la rivereton, grimpis la monteton, kaj tiel alproksimiĝis al la fantoma kunularo, ke li povas rekonii, en la prezidanta figuro, la trajtojn de la Harza demono. Malvarma ekstremo atakis lin por la unua fojo en lia vivo, sed la rememoro, ke malproksime li estis kuraĝa kaj eĉ invitis la renkonton kiu jam okazos, revivigis lian ŝancelantan kuraĝon, kaj kun fiereco aldonanta tion, kio al li mankis en firmeco, li antaŭeniris sufiĉe maltime al la fajro, kie la figuroj, kiuj ĉirkaŭis ĝin, ŝajnis eĉ pli sovaĝaj, fantaziaj kaj supernaturaj, des pli li alproksimiĝis la kunularon.

Li estis bonvenita per laŭta krio de malakorda kaj nenatura ridado, kiun al tiaj streĉitaj oreloj estis pli timiga ol kombino de la plej malgajaj kaj melankoliaj sonoj imagebla. "Kiu ĉi estas?" Demandis la giganto, kunpremante siajn sovaĝajn kaj pliigitajn trajtojn en stato de nereala seriozeco, dum ili estis foje agititaj per la konvulsio de ridado kiun li ŝajnis subpremi.

"Marteno Valdek, la arbaristo," respondis la brava junulo — "Kaj kiu vi estas?"

"La Reĝo de la Izolejo kaj de la Minejo," diris la fantomo, "kaj kial ĉi kuraĝas trudi vin sur miajn misterojn?"

"Mi venis serĉi fajron por reŝanĝi mian fajron, diris Marteno sentime kaj tiam, en sia vico brave demandis, "Kiaj misteroj ili estas kiujn vi ĉi tie festenas?"

"Ni solenas," respondis la kompleza demono, "la edzigon de Hermeso kun la nigra Drakono. Sed prenu cian fajron, kiun ĉi venis serĉi, kaj foriru. Neniu mortemulo povas longe rigardi nin kaj vivi."

La kamparano metis sian lancopinton en grandan pecon de brulanta lingno, kiun li levis nur per granda peno, kaj tiam sin turnis por reiri al sia dometo. La krioj de ridado resonis post li per triobla furiozeco, kaj la sonoj aŭdiĝis malproksime en la malvasta valo.

Kiam Marteno atingis la barakon, kvankam mirigita per tio kion li vidis, lia unua zorgo estis meti la ardan karbon inter la brulajmaterialo por plej bone renovigi la fajron. Li multe provis kun ĉiaj siaj penoj per blovi la karbon instigilo sed la karbo, kiun li avertis el la demonaj fajroj, tute estingiĝis nebruliginte iajn el la aliajn.

Marteno sin turnis kaj vidis, ke la fajro ankoraŭ brulas sur la monteto, kvankam tiuj, kiuj klopodadis ĉirkaŭ ĝi jam malaperis.

Ĉar li pensis, ke la fantomo serĉis kun li, li submetiĝis al sia natura aventuremo kaj decidante sekvi la aferon ĝis la fino, reiris al la fajro, el kiu, sen kontraŭstaro, li forportis sammaniere kiel antaŭe flamantan pecon de karbo, sed ankoraŭ li ne sukcesis relumigi sian fajron. Pro tio ke senpuneco pligrandigis lian riskemon, Marteno decidis fari trian eksperimenton. Li estis same sukcesa kiel antaŭe atingi la fajron, sed, kiam li ree alprenis pecon de brulanta karbo kaj estis sin turninta por foriri, li aŭdis la raŭkan kaj supernaturan voĉon, kiu antaŭe parolis al li, diranta la vortojn, "Ne kuraĝu reiri ĉi tien kvaran fojon." La provo rebruligi la fajron per ĉi tiu lasta karbo estis tiel sensukcesa kiel antaŭe; do, Marteno forlasis la senes-

peran laboron kaj sin ĵetis sur sian liton el folioj, decidante prokrasti ĝis morgaŭ la rakonton al siaj fratoj pri sia supernatura aventuro. Li estis vekita el la peza dormo en kiun pro korpa laciĝo kaj agito de menso li estis falinta, per laŭtaj ekkrioj de surprizo kaj ĝojo. Liaj fratoj, surprizitaj trovi la fajron estingita kiam ili ellitiĝis, komencis ordigi la lignon, por ke ili denove povu bruligi ĝin, kiam ili trovis en la cindroj tri-grandegajn metalajn amasojn, kiujn ilia scio (car la plimulto el la kamparanoj de la Harzo estas praktikaj ministoj), tuj konstatis pura oro.

Liaj ĝojaj singratuloj iom malfortiĝis, kiam ili aŭdis de Marteno kiamaniere li havigis al si la trezoron al kiu ilia propra sperto de la nokta vizio pretigis ilin doni plenan kredon. Sed ili ne povas kontraŭstari la tenton partopreni en la riĉoj de sia frato.

Marteno Valdek nun fariĝis la ĉefo de la familio kaj aĉetis bienojn kaj arbarojn, konstruis kastelon, havigis al si dokumenton de nobeleco kaj al la forta ĉagreno de la malnova nobelaro de la regiono estis rajtigita al ĉiuj privilegioj apartenantaj al aristokrato. Lia kuraĝo en milito, kiel ankaŭ en personaj malpacoj, kune kun la nombro de servituloj, kiujn li subtenis en sia pago, estis dum certa tempo apogilo kontraŭ la malamo kiu naskiĝis pro lia subita altigo, kaj la aroganteco de liaj pretendoj. Kaj jam estis videble en la kazo de Marteno Valdek tiel same kiel estis vidite je multaj aliaj, kiel neeble estas por mortemuloj antaŭvidi la efekton de subita prospero sur sia propra volo.

La malbonaj ecoj en lia naturo, kiujn malriĉeco estis bridintaj kaj subpremitaj, maturiĝis kaj liveris sian malbonan frukton sub la influo de la tentado kaj la povo de sinindulgo.

“Volo kaj deziro leĝojn ne konas.” Tiel unu malbona eco vekis alian. La diablo de avareco vokis tiun de malhumileco, kaj fiereco devis esti subtenita per krueleco kaj perfortajoj.

La karaktero de Valdek, ĉiam maltima kaj riskema, nun per prospero farita severega kaj pretendema, baldaŭ faris lin abomenata, ne nur de la nobelaro sed ankaŭ de la nealtrangujoj, kiuj vidis kun

duobligita malamo la subpreman rajtojn de la feuda nobelaro de la regno tiel senkore uzitaj de unu kiel levigis el la vera feco mem de la popolo. Kvamkam lia aventuro estis zorge kaŝita oni komencis prialkuĝin, kaj la pastroj jam priskribis kiel sorĉiston kaj kunulon de diablo la sentaŭgulon, kiu, akirinte tiel grandan trezoron laŭ maniero tiel stranga, ne penis sanktigi ĝin per donaco de granda porcio de ĝi al la uzo de la religio. Ĉirkaŭite de malamikoj, publikaj kaj privataj, turnementite per milo da malpacoj, Marteno Valdek, aŭ, kiel ni nun devas nomi lin, la barono von Valdek, ofte akre bedaŭris la laborojn kaj plezurojn de sia malriĉeco, kiun neniam eniis. Sed en ĉiuj ĉi tiuj malfacilaĵoj, la kuraĝo ne mankis al li sed ŝajne plifortiĝis proporcie kun la danĝero kiu minacis lin, ĝi neatenditaĵo rapidigis lian humiligon.

Proklamo de la reganta Duko de Brunsvigo invitis al solena turniro ĉiujn Germanajn nobelulojn de libera kaj honora deveno, kaj Marteno Valdek, belege armita, akompanata de siaj du fratoj kaj bone ekipita sekvantaro, tre arogante sin montris inter la kavaliroj de la provinco kaj demandis permeson eniri la turniron.

Tio estis konsiderata tuta plengrado de la mezuro de lia tromemfideco.

Mil voĉoj ekkriis, “Ni ne permesos ian cindrokribranton kunigi en nia kavaliraj ludoj.” Ĉagrenite ĝis frenezo, Marteno eltiris sian glavon kaj dishakis la heroldon, kiu, kompleze al la ĝenerala opinio, baris lian eniron sur la turnirloko. Cent glavoj estis eltiritaj por avenge tion, kio estis en tiuj tagoj konsiderata kiel krimo preskaŭ ekvalenta al sakrilégio aŭ reĝomortigo. Valdek, kiu sin defendis kiel leono, estis kaptita, ĵugita sur la loko de la ĵugistoj de la turniro kaj pro tio, ke li rompis la pacon de sia monarĥo kaj perfortis la sanktan personon de heroldo de turniro, kondamnita suferi, kiel ĝustan punon, la forhakon de sia dekstra mano el sia korpo, esti, kiel malhonoro, senigita el la honoro de nobeleco, de kio li estis netaŭga, kaj esti forpelita el la urbo. Kiam li estis senigita de siaj armiloj kaj submetigita al la kripligo difinita de tiel severa kondamno, la malfeliĉa

viktimo de la ambicio estis lasita al la kanajlaro, kiuj sekvis lin kun minacoj kaj ekkrioj ŝutitaj jen kontraŭ la sorĉanto, jen kontraŭ la subpremanto, kaj kiuj en certa tempo finiĝis en batado. Liaj fratoj (ĉar lia sekvantaro estis forlasinta lin kaj lia disigiĝis), fine sukcesis liberigi lin el la manoj de la popolamaso, kiam, satigita de krueleco, tiu estis lasintaj lin duone morta pro perdo de sango, kaj konsekvence de la turmentoj, kiujn li elportis. Tia estis la genia krueleco de iliaj malamiko, ke al la fratoj ne estis permesate fari uzon de la alia rimedo por forporti sian fraton, ol tia speco de karbista ĉaro, kiun ili mem antaŭe uzis, en kiu ili metis Martenon. sur fasko de pajo, sen espero ke ili atingos ian rifuĝejon antaŭ ol la morto eligus lin el lia mizero.

Kiam la Valdekoj, vojirante en tiel malgaja stato alproksimiĝis la randon de sia naskiĝloko kaj laŭiris valon inter du montegoj, ili vidis paŝantan por rekonti ilin, figuron, kiu unuavide ili pensis esti maljuna viro. Sed kiam li pli proksimiĝis, liaj membroj kaj staturo pligrandiĝis, la mantelo defalis de liaj ŝultroj, lia pilgrima stango ŝanĝis en elradikitan pinarbon, kaj la giganta figuro de la Harza demono staris kontraŭ ili en siaj terurajoj. Kiam li preterpasis la ĉaron, kie kuŝas la mizera Marteno, liaj gigantaj trajtoj tordiĝis en ridetaĉon de nepriskribebla mal-estimo kaj maliceco, dum li demandis de la suferanto, "Kiom vi ŝatas la fajron, kiun miaj ardaĵoj bruligis? La povo de movado, kiun timo haltigis en liaj du fratoj, ŝajnis redonita al Marteno de la energio de lia kuraĝo. Li sin levis en la ĉaro, sulkis la brovojn, kaj pugnigante la manon, minacis la fantomon kun netera rigardo de malamego kaj malico. La genio malaperis kun sia kutima laŭtega kaj tondranta rido, kaj lasis Valdek lacigita per tiu lasta peno de mortiganta viro. La terurigitaj fratoj direktis sian ĉaron al la turoj de Monaĥejo, kiu altiĝis en arbareto de pinarboj apud la vojo. Ili estis bonfarele ricevatataj de nudpieda, long-barba kapuceno, kaj Marteno vivis nur sufiĉe longe por kompleti la unuan konfesadon faritan post la tago de sia subita prosperado, kaj ricevi absolvon de tiu sama pastro

kiun, precize tiun tagon antaŭ tri jaroj, li helpe forpelis per ŝtonoj el la vilaĝo de Morgentrodt. Oni supozis, ke la tri jaroj de necerta prospero havas misteran rilaton kun la nombro de liaj vizitoj al la fantoma fajro sur la monto.

La korpo de Marteno Valdek estis enterigita en la monaĥejo, kie li mortis, kaj liaj fratoj ligiĝinte kun la monaĥaro vivis nur por la bonfaremo kaj religio ĝis la propra morto. La tero posedita da Marteno, al kio neniu pretendis iun rajton, kuŝis senkulturita ĝis ĝi estis reprenita de la Reĝo kiel nuligita feŭdo, kaj la ruinoj de la kastelo, kiun Marteno estis nominta la kastelo Valdeka, estas ankoraŭ unu evitataj de la ministoj kaj la arbaristoj kiel sorĉizitataj de malbonaj spiritoj. Tiamaniere la mizeroj kiuj sekvas, riĉojn subite akiritaj kaj malbone uzitaj estas spegulitaj en la fortune de Marteno Valdek.

(Eltiraĵo el "The Antiquary," romano de Sir Walter Scott, 1771-1832. Tradukis el la angla Karolo Madrigalo).

"The Esperanto Guide."

Translation of the Exercises.

Exercise 18.—Kial vi ne akompanas lin, kiam li venas al mi? Ĉar mi havas multe (or: multon) por fari, kaj ne povas trovi la necesan tempon. Vi amas sin, sed ĉu ŝi amas vin? Diru al mi la nomon de la homo, kiu vivas kontraŭ vi; mia amiko deziras paroli kun li. Ŝi estas mia onklino, ĉar mia patrino estas ŝia fratino. Montru al ni vian ĝardenon; oni diris al ni, ke ĝi estas tre bela. Tiu homo amas siajn infanojn multe pli, ol (li amas) sin. Jen mia filo; zorgu pri li, kiel pri vi mem. Post la vespermanĝo, miaj gastoj akompanis, siajn amikojn ĝis ilia domo. Miaj gastoj akompanis siajn amikojn ĝis sia domo. Kie vi lavis vin? Mi lavis min en la ĉambro de Stefano, kaj li lavis sin tie ankaŭ. Li forgesis sian libron. Ŝi forgesis sian libron. Ŝi forgesis sian libron. Ŝi neniel zorgas pri sia filino, kaj tute ne gardas sin.

Exercise 19.—Vere, estus tre bele, ke mi iru al li, post tio, kio okazis. Sed kia estas via opinio pri tio? Mi sufiĉe montris ĝin al vi, mi pensas; mi volas, ke vi tien iru, ĉar vi devas

pardonu lin. Kial vi ĉiam marmuras pri liaj ordonoj? Ili donacis al mi du belegajn argentajn vazojn. Tuj kiam mi eliris, mi vidis venantan al mi maljunan sinjorinon, vestitan blanke, kiu ŝajnis al mi esti ia riĉa loĝanto de la urbo. Mi petis de li trinki, ĉar mi tre soifis; sed mi volis nur akvon. Mi volis vidi, kiel grandaj estos liaj malboneco kaj malĝentileco. Ĉu li venis tien ĉi por doni trinki al la birdoj kaj manĝi al la hundoj? Tiu sinjorino estas tre kvieta kaj tute ne fiera; tial ĉiuj tre volonte parolas kun ŝi. Li estis tiel servema, ke mi faris al li malgrandan donacon. Ni alportis ĉion, kion ni trovis. Perlaro; nomaro; fearo (or: feinaro); domaro; ĉambraro; forgesema; murmurema; zorgema; kurema; pardonema.

Exercise 36.—Viaj gepatroj venis viziti nin hieraŭ kun viaj gefratoj. Gesinjoroj K. akompanis ilin. Mi vidis la junajn gefianĉojn hieraŭ vespere; ili ŝajnis tre feliĉaj. Se sinjorino Malaprop estus esperantisto, ŝi nomus ilin gefiasoj. Viaj geonkloj gratulis min hodiaŭ matene telegrafe. Mia bofratino estas la plej bela el la virinoj; sed estas aferoj, kiujn ŝi neniam komprenas. Ĉiuj parencoj de mia edzino estas miaj boparencoj. Liaj prapatroj estis oficiroj en la Rusa armeo. Mi volas aĉeti bovidon. Kiom vi volas doni al mi por ĉevalido. Ne pli, ol dek funtoj.

Exercise 37.—Ĉiu regno enhavas urbanojn kaj vilaĝanojn, kiuj estas samregnanoj. La regnestro povas esti reĝo, imperiestro aŭ prezidanto de respubliko. La polico estas utila institucio, kiam ĝi zorge plenumas siajn devojn. Kie loĝas via lignajisto? Mi volas, ke li faru por mi seĝojn. Mi iros unue al la lignisto kaj aĉetos lignon. Kara sinjorino, ĉu vi konas junulinon, kiu estus bona

kuiristino, ĉambristino aŭ infan-
tino? La riĉuloj ofte ne eĉ suspek-
ta suferojn de la malriĉuloj.
estas timulo; li konfesis, ke li
kuraĝus iri tien. La Angla vo-
"writer" havas du sencojn; kaj
la senso ni tradukas ĝin en Esp-
anton "skribisto" aŭ "verkist-
Ruzulo; justulo; frandemulo; dika-
lertulino; militestro.

Anoj de Klubo de Eksterland-
Lingvoj deziras korespondi pri
demandoj de scienco, politiko
vivo en lingvoj Esperanta, Ang-
Franca, Germana, Itala, Rusa
aliaj. Adreso: Klubo de Eksterland-
Lingvoj, Tomsk, Siberio.

Al niaj Subtenantoj.

Por ke ni povu malpliigi la kos-
tojn de ĉi tiu gazeto kiel eble plej mu-
ni ne sendos kvitancon por sum-
ricevitaj, sed ĉiam kvitancon la rice-
en ĉi tiu kolono. Ni esperas ke
el niaj abonantoj tuj renovigos
abonon kaj varbos novajn abonantojn.
Ni ricevis la jenajn sumojn,
danko:—

A. Koenig, 4/6; M. E. Steitz, 4/6;
C. T. Tonker, 5/-; F. T. McArdle,
1/6; L. A. Miller, 4/6; Geo. May,
4/6; Fino Conwell, 4/6; M. C. Tru-
dell, 1/6; Sino Wilson, Melb., 4/6;
T. H. Gilhooly, 5/-; Fino G. W.
Liamson, 4/6; D. Guilbert, 4/6;
Middleborough, 4/6; E. F. Herita,
4/6; E. J. Appleby, 4/6; T.
O'Donoghue, 4/6; — Sullivan, 4/6;
— Martinek, 4/6; L. O'Connor, 4/6;
F. Cherrett, 4/6; V. L. M. Dan-
(N.Z.), 4/6; — Hassan (N.S.W.),
4/6; E. Tamm, Estonio, 10/-;
Saar, W.A., 10/-; G. Hilbig, 4/6;
G. E. Jones, N.Z., 4/6; A. Aub-
Qu'd., 4/6; C. H. Kamp, 4/6.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books.

Free to You.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association
Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by
Fraser & Morphet, Printers, Eastbourne Street, Windsor.